Regione

DELEGITRETA OGANO BR/UEA
JARO 7 N-ro 10 1-a Semestro/2002

REGIONAJ DELEGITOJ
DELEGITOJ
VICDELEGITOJ
FAKDELEGITOJ

131 FAKOJ
247 INDIVIDUOJ
5 REGIONAJ DELEGITO
88 DELEGITOJ
36 VICDELEGITOJ
216 FAKDELEGITOJ
12 JUNULARDELEGITOJ

REGIONOJ:

AMAZONIO

NORDORIENTO

CENTROKCIDENTO

ORIENTO

SUDO

ANALIZE

La 14 titoltemoj :
ANALIZE-BIOGRAFIETE, INFORME, KIAL DR? LA "KAZOJ", LA RETO, MENCIOJ, METODOJ, SPRITE,STA STATISTIKOJ,ŜANĜOJ, UEA-JL-2002 VERKE,VOLONTE interligiĝas,preskaŭ malfacile disigeblaj.Tiel,mi provis kompiladon proksimuman, sed ili fariĝas unu nura temaro specife al DELEGITA RETO kie ni trovas ilin la homojn,je pluraspekaj kontribuoj, taskoj, agadoj, ktp.
La riĉeco de tiu ampleksa sistemo DR(ki el tiom da aliaj en nia movado),atestas la pravigon de ĝia estiĝo. Nia Esperantejo (ujo?!) estas vere konkreta estaĵo, realisme plurforma, respegule al la ĝenerala homara sinteno inter si, ekster si. Sen strikta organizadebleco, kun volontule personeca, aŭ/kaj grupeca agado; plurforma, elstara aŭ ne, tamen profunde tipa de la nun tempa realo. Jen kelkaj tre resumaj esprimoj. La lakromon parte vi trovos enpaĝe de ***"Regione"***, ĉio realisme respegule de la momenta panoramo, ne nur esperantista, sed REGIONE tutmonda.
Antaŭen!

Symilde Schenk Ledon
ĈD-UEA/BR

BIOGRAFIETE

(07/07/2001)

" Mortis Otaviano Curvelo de Souza, UEA-VD kaj FD en la urbo Itabuna, Bahia,BR.Li estis grava laboranto pro Esperanto, postlasas esperantan biblio tekon(libroj, revuoj, mapoj ktp).Lia familio deziras transdoni libraron al "UESC-Universidade Estadual de Santa Cruz" inter la urboj Itabuna kaj Ilhéus, por la fondo de "Tema Nukleo Otaviano Curvelo de Souza pri Esperanto". UESC devus doni spacon kaj administri novan nukleon. UESC posedas kelkajn profesorojn,kiuj estas esperantaj simpatiantoj, kaj eĉ unu UEA-FD, mi mem, kaj alia eksa ,Paulo dos Santos Terra.La problemo, tute nova - estas: ekzistas granda antaŭjuĝo kontraŭ Es

peranto, "morta lingvo", neebla lingvo sen socia fondo", ktp. Tuj la familianoj de Otaviano kune kun simpatiantaj profesoroj proponos la aferon al Rektorino Prof: Renné Albagli Nogueira."
(Hilmar I. S. Ferreira,FD Itabuna-BA)

* * *

"Lastan dimancxon (7/10/01) kiam mi revenis de Camboriu, mi trovis strangan mesaĝon de sinjoro en la angla lingvo! Li diris: "Mi estas nevo de E-isto el Londono kaj mi volas koni vin." Mi telefonis al li por renkontiĝi kaj promeni kiam li alvenos al Brazilo, kio fakte okazis per familiaj kaj distraj programeroj, uzante plurlingvan babiladon, inkluzive kaptinte novan E-iston, ĉar li promesis praktiki la internacian lingvon kaj ĉeesti UK-Fortaleza!" (PS-S-ino Symilde: Vi kulpas pri ĉio,ĉar vi insiste delegitigis min ! Tamen mi esperas havi sukceson kaj kapablon bone paroli E-on venontfoje!"
(Mariselle Zimmermann,FD S.Paulo, SP)
-Prizorgas turisman entreprenon "SUP-VOJE", dirante: "Dum la irado troviĝos la verdaj steloj,kiuj lumigos niajn vojojn kaj havigos al ni esperon."

* * *

Kolego el alia kontinento:
(Sun Minĝiano, D-FD Zaozhuang,Ĉinio)
"Mi estas ĉina delegito en Zaozhuang-urbo pri ĉinaj kulturoj, komerco kaj E-o: Mi sukcesis kulturigi dek novajn e-istojn en nia lernejo; mi kontaktis kun gravuloj de nia urba registaro por nia Movado. En 20-21/11/01 mi gastigis 14 japanajn e-istojn sub monsubteno de urba registara. Laborplano por 2002: Fondi oficejon en Vjetnamio, utiligi nian lingvon en komerco kaj ekonomio en la nomo de la registaro,organizi grupojn de ĉinaj kulturoj por internacia interŝanĝo pere de E-o, aperigi E-an libron pri nia urbo, esplori utiligon de E-o en tekniko kaj komerco,funkciigi lernigadon de E-o, ĝemeligi nian urbon kun Granada, Hispanio kaj petas subtenon/helpon de UEA."

"Kiel Delegito mi estas komencanto tiel kiel vi mem jam scias.Sed mi faras la boron en diversaj lernejoj pere de prelegoj, ekspozicioj, disdonado de E-materialoj, prezentado de poezioj;muzikoj ktp. Entute dum ĉi jaro mi prezentis le Zamenhofan lingvon al tiuj 500 personoj/lernantoj, kiuj ankoraŭ ne konis E-on. Ankaŭ ĉe DECEYP, kiel delegito prezentis observon de la propono de UEA por la jaro 2001-2010. La debatoj daŭros dum la jaro 2002."

(Rogério de Freitas,D en Valença, RJ)

* * *

"Mia nomo estas Saliba (arabdevena familinomo,kiu estas "kruco" en la araba origine ĝi reprezentis la "unuajn kristanojn"ekde 200 p.K. en la regiono de Zahle, Libano). Multaj fakte misliteru mas mian nomon al "saliva", kaj dum miaj gimnaziaj tagoj multege mokis min per tiu buŝŝaŭmo-kromnomo. Mi scias ke, hispane, ambaŭ sonas egale. Eble pro io via misliterumo.Tute senĝene, vi ebligas min, per via miso, al ĝenerala klarigo pri mia nomo."
(Adonis M.Saliba Silva,FD en SP, SP)

INFORME

58-a IJK,Pato Branco,PR-Brazilo 21-28/07/2002

LINGVO,KULTURO KAJ DIVERSECO

La kongreso okazos ĉe la suda Brazilo,en la urbo Pato Branco, kiu estas ĉirkaŭ 3.000 km de Fortaleza. Oni organizas karavanon interkongresan, ĝi daŭros unu semajnon,estos busa kaj haltos interalie en Rio kaj Salvador. Kiel frandaĵo estos ŝanco iri al Foz do Iguaçu en la ekskurso, ĉe la landlimo de Argentino kaj Paragvajo.

Adreso por aliĝo:Gov.Jorge Lacerda,88 - PATO BRANCO, PR 85501-400 / BR

Pliaj informoj:
www.tejo.org/ijk
www.ijkpatobranco.com.br
oliveira.eduardo@ig.com.br
(Informis:Carlos Eduardo Oliveira,JD-FD Paulínia, SP)

Ŝanĝoj por Jarlibro UEA

Dum la jaro,kiam bezone,atingebla ĉe CO-UEA je retadreso: jarlibro@co.uea.org -Bv.konsideri ke ankaŭ la landa ĈD kaj/aŭ RD-oj estu informitaj cele al la aktualigo dosiera.

* * *

KIAL DR ?

Iam, la ĈD ricevis jenan mesaĝon de FD: *"Mi petas al vi serĉi por mi(mi jam estas laca serĉi,sen sukceso)se la Prof.ro F.A. industria kemiisto,ankoraŭ vivas kaj kiamaniere mi povas kontakti lin.Li estis plu raj jaroj antaŭe, estro de Instituto A. de Traserĉoj Biohemiaj, en urbo SP kaj li faris produkton nomata SKRILL, kion mi ankoraŭ uzas, kun bonaj rezultoj por la sano; tiu produkto estas farita kun elementoj el la alta maro). Pluraj jaroj antaŭe tiu produkto estis vendita en butikoj kaj en pluraj aliaj grandaj urboj brazilaj. Do tio estas la informo kiun mi havas pri li; eble ankaŭ la Universitato povos scii pri kie li loĝas kaj laboras. Mi antaŭdankas vin pro via helpo en tiu ĉi afero."*

La ĈD respondis jene: *"Vian mesaĝpeton mi provis plenumi, kvankam mi ne plu loĝas en urbo SP. Parenco tie loĝanta helpis min pere de Telefonnlistoj;bonvolu noti la numerojn de la Profesoro, plus du aliajn de farmacioj, kiu vendas la produkton."*

La FD respondis: *"Mi dankegas vin pro via valorega helpo pri tiu informo, rilate al la Profesoro. Mi jam kontaktis lian sekretariinon. Bedaŭrinde li estas ege maljuna kaj havas problemojn por bone paroli.Kore kaj samideane,M.F."*

* * *

LA "KAZOJ"

-Estas urbo, kie la Delegito en la Jarlibro 2000 havis adreson, kiu estis ŝanĝita en Jarlibro 2001 kaj en JL 2000 de BEL aŭ koraŭ aperas alia adreso. Pertelefone neatingebla kaj la datlimo raporta finiĝaanta! Espereble estis alirektaj kontaktoj kaj (nepre ne pere de la ĈD!) Jarlibro 2002 ĉi on bone kaj bele enordigos...

-Por identigi ekzaktecon, la duboj koncernas eventuale pri respondeco ĉu de la koncerna Delegito, ĉu je la kompostado de la Jarlibro, ktp. Tre gravas reviziado rigora ĉiamaniere, plurflanka. Indas ke ĉiu Delegito unuope kontrolu siajn proprajn donitaĵojn kaj tuj komuniku ilin kaj al UEA kaj al ĈD kaj/aŭ RD.

* * *

LA RETO

"Ĉe unua ekzameno,ŝajnas ke nia lingvo ne havas ŝancon. Sed la espero estas ke Esperanto estas fakte internacia, nenies propraĵo.Multaj personoj surpriziĝas kiam mi montras la Jarlibron de UEA, dirante "mi ne imagis ke Esperanto estas en tiom da landoj". Jes! Eble ankoraŭ malmultaj parolantoj, sed en multaj landoj." (D Waldomiro Arenhart, Balneário Camboriu, SC)

*

"Estimata S-ino,mi trovis vian retpoŝtan en la Jarlibro,kaj nun petas vian helpon. Hieraŭ mi ricevis leteron de S-ro Mauricio Monken Gomes, kiu petas ke mi traduku por li ion, mi volas kontakti lin per reto, sed mi forgesas lian retpoŝton, ĉu vi povus sciigi al li, ke li skribu al mi? Jen lia telefono (Caraguatatuba): (012)4221089,Fakso 4221377.Antaŭdankon por via helpemo. Sincere via Zhang Xuesong,Xiniang,Henan, Ĉinio" Retoj:deodaro@263.net
turismo@371.net

Respondo:

"Estimata S-ro: Post longtempa foresto, pro vojaĝoj kongresaj, krom komputilaj malhelpoj, nur nun mi sukcesas respondi al via mesaĝo .Se temas pri la retpoŝta adreso de S-ro Monken Gomes, jen mi informas vin: mmonken@uol.com.br (ĈD-BR)

*

"Karaj Ĉefdelegitoj,delegitoj kaj peranoj:Mi pensas,ke ne malmultaj el vi jam aŭdis pri mia hejmpaĝo de Esperanto-Radio Inter reta (ERI);aŭ jam vizitis ĝin. Intertempe mi kolektis multajn fotojn kaj voĉojn de konataj e-istoj de la mon

do, kaj prezentis ilin en la menuo "Foto voĉa albumo" en mia hejmpaĝo, por ke tutmondaj esperantistoj konatiĝu kun ĝi li kaj utiligu ilin por nia movado: prezenti nian movadon al ne-esperantistoj. Mi invitas vin ĉiujn al mia Foto voĉa albumo. Tiuj, kiuj konsentas kun mia nova plano,bv. sendi al mi fotojn kaj voĉojn surbendigitajn. Se vi scipovas sendi ilin (foto kaj voĉo) pere de interreto, tio estos pli oportuna kaj rapida. Mi estas certa, ke ĉi tio estas tre bona ŝanco diskonigi vin mem al tutmondaj samideanoj.Via profilo:foto, nomo, adreso, laboro, ret-adreso, telefonnumero, verkoj (libroj,disertacioj) ktp. Sendu al:Yong-Am-Malu,Qpt.106-1101, Ssangyong-dong,Chonan-shi 330-090, Koreio.Retadresoj: leonokr@yahoo.co/kr

leono@hanmir.com

Sincere via MA Young-tae"

(ĈD-FD en Chonan,Korea Respubliko)

* * *

"Karaj, la suba temo estas unu el la plej gravaj kulturaj projektoj en virtuala Esperantio, kiu multege povos helpi la esperantistaron retkonektite, same kial PMEG kaj REVO.Fakte estas enciklopedio farita dinamike per la retanoj tra la tuta mondo. Oni ne nur havas la esperantan version, sed ankaŭ portugalan, al kiu multe povus kontribui la brazilanoj kaj ĉiuj portugallingvanoj al la portugala reta enciklopedio. Alinaciianoj same kontribuu al sia lingva enciklopedio.Tamen, ke ni esperantistoj forte klopodu al tiu kunlabora senpaga konsult-enciklopedio, per siaj propraj meti-/eduk-/hobi-/fak-kapabloj. Ili nepre petas ke oni skribu x-sisteme por ke la sistemo en ne praa estonteco tuje tradukiĝu aŭtomate al unikoda sistemo. Ĝuste pro tiu fakto, ke mi mem realkutimiĝos al tiu "ĝena" sistemo por mi, ĉar oni ne plu eblas tiel libere elekti inter aliaj, se oni fakte volas kontribui al postvivanta e-tekstaro en interreta medio.Se estu nure uza

ta la x-sistemo, tio faciligos la unikodi ĝon. Ni esperantistoj fakte devas rez pekti tiajn kondiĉojn pli facile, se ĝi helpos la stabiliĝon de esperanto en la reto.
Kontribue kaj amike via Adonis.
(Adonis M.Saliba Silva, FD en SP,SP)
TEKSTO:
"Verkistoj bezontaj! La tutaj sekcioj de ĉi tiu enciklopedio en Esperanto:
http;//eo.wikipedia.com
dediĉitaj interalie al fiziko, kemio kaj biologio estas malplenaj! Mi esperas ke iuj el la legantoj de ĉi tiu mesaĝo kontribuos per siaj artikoloj al la komuna projekto de starigo de senpaga universala enciklopedio en Esperanto."

* * *

MENCIOJ

-Gratulojn al FD Lia Milhomem Moreno, en Brasília, DF kiu delegitiĝis por "Katoj" ĉar nur troveblis antaŭe Marjorie Boulton, kiel samfake!

*

-La D Aldenora Mendonça das Mercês en Nova Iguaçu, RJ ordiganto de eventoj,dum la 15-a Internacia Kongreso de Odontologio,lastjare en urbo Rio de Janeiro, efektivigis ekspozicion esperantistan, bone vizitatan,kies adresoj estis notitaj por posta kontakto informa, kion plenumis la koncernaj grupoj esperantistaj lokitaj en ties urboj.

*

-AGO-TAGO vigle okazis kaj ne eblus citi ĉiujn DR-anojn kiuj ĝin partoprenis organize, tamen mencie:
D kaj FD Aloisio Sartorato, en Rio de Janeiro informis:"Hodiaŭ matene okazis sukcesinta Ago-Tago en la centro de Rio de Janeiro. Komune orgnizita de Kultura Kooperativo de Esperantistoj kaj Asocio Esperantista de Rio de Janeiro,ĝi kunigis 15 gesamidenojn, kiuj entuziasme disdonis prospektojn al la preterpasantoj, kiuj scivoleme ne nur ricevis la propagandilon sed multaj alparolis la esperantistojn, farante demandon pri la afero. Entute oni distribuis 3000 flugfoliojn.Oni ankaŭ me

tis grandan rubandon sur la kradoj de la publika ĝardeno de Largo da Carioca kun la teksto en portugala lingvo:"Lernu Esperanton,la Internacia Lingvo kaj havu amikojn en la tuta mondo",kiu trafe atentigis la publikon pri la evento.Ĉiu el la partoprenantoj de la evento survestis T-ĉemizojn kun teksto en aŭ pri Esperanto. En du aliaj kvartaloj de Rio de Janeiro (Ilha do Governador kaj Santa Cruz)oni okazigis similan agadon.

*

FD Aparecida de Souza Araujo, en urbo SP,de la Departemento de Diskonigado de Esperanto-Asocio de SP, realigis kun pluraj lokaj esperantistoj manifestacion ekspozicie ĉe la enirsalonon de la Fakultato de Filozofio, Beletro kaj Humanaj Sciencoj, ekde la 8.00-a matene. Okazis distribuado de flugfolioj, elmontro de libroj kaj revuoj.Estis ankaŭ vendeblaj lernolibroj,vortaroj, KD-oj ktp, kio multe allogis la homojn, en proksimuma nombo de 1000, kiuj estas beletro-kursanoj.

*

Omaĝe al eminenta eks-ĈD Jorge das Neves,al kiu la nuna ĈD devas sian postenon, ni transkribas raporton faritan de li, kie oni rimarkas la ĉiufojan referencon de posteno delegitreta,rilate la koncernanton: "Geamataj kaj Geamantoj, la 8-a Renkontiĝo de Granda Rio ĵus okazis en bela, suna dimanĉo, 21/10/01, ĉe Lernejo Juan Montalvo, en Jacarepaguá , organizita de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro. Alfredo Aragón, FD pri muziko, bonege estris la programerojn. Jair Salles, FD pri kristanismo: evangelio, gvidis la kurson por komencantoj,kie debute brilis Prof.ino Nylsa. Pri la temo "Kial Esperanto?" ĉef prelegis D-ro Paulo S. Viana, VD kaj FD pri medicino: gastrenterologio. Lerte prelegis pri "La Ovo kaj la Kokino" Gilbert René Ledon, VD kaj FD pri SAT, anarkio. Surbaze de Zamenhofa teksto fundamente parolis Inĝ.Floriano Pessoa, FD pri petrol industrio. Nutris nin antaŭ la tagmango nia poeto, verkisto, vortaristo kaj honora membro de UEA, Prof. Sylla Chaves, kiu prelege lanĉis novan kurson por televido.

Dua parto de la programo komenciĝis per tre agrabla prelego de Danilo Villela, FD pri matematiko,kies temo "Kion Esperanto donas al ni", montris interesajn aspektojn de liaj spertoj en la Movado. S-ino Symilde Schenk Ledon, (nia ĉefdelegito), revenis al la temo de la ĉefprelego kaj estris debaton kaj akceptis demandojn al la prelegintoj. Alfredo Aragón prezentis la trobojn verkitajn pri la ĉeftemo dum la evento mem.Pri la konkurso de troboj kaj arta vespero ni raportos aparte.Kiam la atentaj okuloj de nia kara RENATO CORSETTI venas al la fino de ĉi tiu raporto, certe li perceptis,ke en Brazilo UEA multe laboras pere de la kultura valoro de nia delegitaro." (Ĵorĵi)

astroneves@infolink.com.br

*

El "*ESPERANTO NUN*", N-ro 3/2001,redaktata de FD Elma do Nascimento, Rio de Janeiro, RJ:

"ESPERANTO FUNKCIAS EN LA TUTA PARTO DE LA PLANEDO! TIU, KIU NE KREDAS EN LA VENKO DE ESPERANTO, JAM ESTAS PERDITA EN LA MONDO DE LA MISKOMPRENO...!"

*

"Antaŭhieraŭ, en la kadro de la Kampanjo iniciatita de Kultura Kooperativo de Esperantistoj "Esperanto en la Bibliotekoj de Brazilo", estis sendita pakaĵo kun dek libroj en aŭ pri Esperanto al la Centra Biblioteko de FURB, en la urbo Blumenau, en Federacia Ŝtato Santa Catarina. Ĝi estas la kvara publika biblioteko, kiu ricevas donacon de E-aj libroj. La aliaj, kiuj jam ricevis la samon estas la Nacia Biblioteko, en Rio de Janeiro,la Publika Biblioteko de Barra do Garças,en Mato Grosso kaj la Urba Biblioteko de Niterói, en Ŝtato Rio de Janeiro.(D kaj FD en Rio de Janeiro,RJ Aloísio Sartorato)

*

JARFINAJ MESAĜOJ

Koran dankon al ricevitaj bondeziroj de Delegitretanoj:esperanto-abreu@vetorialnet.com.br//jmcoelho@uol.com.br//neidebarrosrego@urbi.com.br

EKSPOZICIO

Monda Filatela Ekspozicio Hafnia 01 alju ĝis 83 poentojn al la kolekto "Babelo estu detruita!" per "vermejla" medalo (orumita arĝenta),oktobro 2001,de FD en urbo Cam pinas, James Rezende Piton, ankaŭ estrara no de BEL por Eksteraj Rilatoj, UEA-Ko misionano por Ameriko, en BR, Redaktan to de AktivAmeriko; en Loka Kongresa sa Komitato de UK-Fortaleza por kongre sa Kuriero, Komitatano A kaj Konsilanta Membro de la Estraro de EASP.

GRATULON!

METODOJ

En la Delegita Reto la labormetodoj estas liberaj, tio signifas ke la Ĉefdelegito mem strukturigas ĝin. Ĉar en BR ni havas Regi onajn Delegitojn, certgrada interliga laboro okazas, tamen ankaŭ tre laŭ meminiciato, do vere kunlabora sistemo,eĉ subkomprene de individua planado. Tiu klarigo estas a parte loka,do la situacio en BR,kaj absolu te ne kontraŭas la bazan Regularon de De-gita Reto de UEA.Speciala mencio al RD-oj de Oriento kaj Sudo,respektive Luiz Al berto de Oliveira Coelho kaj Gloria Lucia Perine. Luiz organizis enketilon kun jena demandaro:1- Ĉu vi ricevis leteron (konsul tojn, ktp) lige al via (Fak)Delegita Ofico? Kiom? 2.Ĉu eksterlandanoj vizitis vin? Ki om? Ĉu ankaŭ aliurbaj? Kiom? 3. Ĉu vi u zis la Delegitan Reton? Kiom-foje? Ĉu ga zete? Ĉu radie?Ĉu televide? 4.Ĉu vi publi kigis gazet-artikolojn? Kiom? 5. Ĉu oni intervjuis vin? Kiom-foje? Ĉu gazete? Ĉu radie?Ĉu televide?6.Ĉu E-Renkontĝojn aŭ similajn eventojn vi partoprenis? Ĉu Inter naciajn? Naciajn? Regionajn? 7.Kiujn Es peranto-gazetojn vi kutime legis aŭ abonis (Ne forgesu la brazilajn)? 8. Se vi volas ra porti ankaŭ pri aliaj faroj/spertoj (kursoj, prelegoj, eldonoj, peradoj, k.s.) ne hezitu. Ĉiuj informoj ege bonvenas. 9.Ho jes: Se estas adresŝanĝoj, profitu la oportunon.

RESPONDOJ de Luiz Antônio Pereira de Oliveira Jr., FD en Uberlândia, MG:

1. R-*Jes, 6 konsultoj.Ili okazis en Majo, Junio, Julio, Novembro (2) kaj Decem*

bro. 2. R-*Jes. 03 gebrazilanoj el SP, S. Bernardo do Campo, Araxá. En 23-a de Novembro. du gejunulaj francoj (Raĉel kaj David), perinterrete, petis min informi pri Uberlândia kaj montris interesoni koni ĝin. Sed ili ne povis halti kaj daŭrigis la vojaĝon al Brasília, DF.* 3.R- *Jes. Unufoje. Kiam okazis BKE-2001, Brasília - DF.* 4.R-*La komunikado nomiĝis"Esperanto - instrumento de monda komunikado sen perado aŭ kultura hierararkio: respekto, solidareco kaj interpersona integriĝo", aperis sur paĝoj de Analoj de la "Tria Seminario de Edukado", realigita por Majstreco de Edukado-UFU (Uberlândia Federacia Universitato)inter 04 ĝis 06 Decembro. Temo: "La Unuo kaj la Diverseco en Lerneja Edukado: Historio, politiko, scioj kaj praktikoj". Mi kunordigis ses aliajn akademiajn komunikadojn. Pli malpli ses artikoloj estis publikigitaj sur paĝoj de loka spirita bulteno: "Vivo Spirita".* 5.R- *Jes. Mi estis intervjuita unufoje. Ĝi estis publikigita sur paĝoj de loka ĵurnalo"Correio" en 29/08 /01. Okaze de"Forumo de Popolamaso Komunika kaj Eduka de Uberlândia"; evento kiu estis montrita per komputila reto, inter 14 kaj 15/12/01, mi profitis la okazon kaj petis honoran memoraĵon pri L . LZamenhof(datreveno). Mi informis ankaŭ ke la Esperanta Movado estas Internacia. Kiam esperantistoj interrilatas, ili okupiĝas pri homaj rajtoj.* 6. R-*37-a Brazila Kongreso de Esperanto, Brasília-DF,julio/01, Renkontiĝo de Esperantistoj kaj Spiritistoj", Uberlândia-MG, Minasa Renkontiĝo de Esperanto, Belo Horizonte, MG,decembro/01.* 7. R- *Esperanto, Esperanto Katolika, Internaciisto, Trefo, Simpozio. Brazila Esperantisto, SEI-Esperante, La Lampiro, Lingva Folio, Komunikoj,A Semente, Esperanto - Notícias. O Arauto. Esperanto Nun, Saluton Gesamideanoj, Bahia Informilo.* 8.R- *Mi instruis dum 2001 du E-*

Kursojn. Diversfoje en ĉi tiu jaro, mi interparolis kun Sekretario Municipa de Edukado, José Eugênio de Freitas pri la efektivigado de la Leĝo 7722 sankciita en 21/12/00.Tiu Leĝo permesis la Instruadon de Esperanta Lingvo ekde 5-a klaso en Municipaj Lernejoj. Nuntempe, ni kune serĉas rimedojn por reguligi la leĝan kon keron.Pro tio,ni jam kontaktis nuntempan BEL-Prezidanton, S-ro Lício de Almeida Castro. En junie, mi denove estis invitita de de UEG (Ŝtata Gojasa Universitato Catalão-GO) okaze de la "Dua Simpozio pri Beletro - Lingvaĵo kaj Literaturo". En ĝi mi kaj Siloé (Goiânia, GO) prezentis la temon: " Esperanto en Tria Jarmilo". La 20-an de septembro estis realigita la evento: "Esperanto en Lernejoj". Pli ol 31 instruistoj kaj respondeculoj de lern ejoj partoprenis.

*

RETADRESE

Regiona Delegito de Oriento, Luiz Alberto, plie kontaktis koncernajn DR-postenulojn per elektronika poŝto kaj sukcesis 50% da atingoj. Jen kelkaj demandoj/respondoj sin teze:

-Ĉu eksterlandanoj vizitis vin?

-Jes, mi kaj mia edzo Walmir kune kun Aloísio Sartorato ĉiĉeronis la francan, ju nan paron Boris kaj Veronique Bouchez en vizito al urbo Niterói.

-Se vi volas raporti ankaŭ pri aliaj faroj/ spertoj, ne hezitu.

-Mi faris prelegon esperante sub la titolo "Miaj spertoj pri kongresoj de E-o", mi partoprenis dum la tuta jaro de la progra mo "Gutoj de E-o", gvide de Sylla Chaves en Eduka TV Stacio de Rio de Janeiro, per deklamado de poemoj kaj per partopreno en dialogoj.Tie mi kantis "La suno mia", el kio rezultis ricevon de plu raj retmesaĝoj de multaj samideanoj de brazilaj urboj. De alilandaj esperantis toj interalie mi ĝoje mencias Renato Corsetti kaj Atilio Orellana Rojas. Dum la tuta jaro mi deklamis en diversaj ur

Mi sukcesis la duan premion en Konkurso de Poezio EKRA,okazinta en Razgrad, Bulgario, sub aŭspicio de Kooperativo de Literatura Foiro, en la branĉo originala poezio. per la poemo "Sublimado":

Pli facile por mi estas etendi la
manojn ĝisĉiele
kaj pluki stelon
ol tuŝi vin karese
kaj senti la brilon de viaj okuloj en la miaj.
Pli facile por vi estas plonĝi en la maran malhelon
kaj el ostro forpreni nigran perlon
ol meti en mian bruston, esperon
kaj en mian fingron ringon.
Ne plu interesas al mi
astroj
aŭ ringoj
aŭ perloj
aŭ vi.
Mi elfosis perditajn revojn,
kolektis maltrankvilojn,
kunigis dispecitajn erojn de memoro muta
kaj ĉion ŝanĝis en versojn.
Mi kantos ĝis la fino.

FD <neidebarrosrego@urbi.com.br>

*

-Ĉu vi uzis la Delegitan Reton?

-Ĉi-jare per la reto mi ofte korespondas (private aŭ perliste) kun UEA-D-oj sed pri ĝeneralaj aferoj.

-Ĉu vi publikigis gazet-artikolojn?

-Jes, unu traduko por Brazila Esperantisto kaj unu artikolo en la rubriko "El interreta mondo"

-Ĉu oni intervjuis vin?

-Trifoje: du por e-programoj en radio stacioj de Sorokaba kaj unu en Volta Redonda.

-Se vi volas raportu ankaŭ pri aliaj faroj.

FD <jmilanez@hotmail.com

-Mi gvidis E-kurson ĉi-jare,dum la dua semestro en la provinca universitato de Campinas,kunorganizis tri renkontiĝojn de E-o,kunlaboris ĉe BE por tradukoj kaj redaktas"El interreta mondo"

RD por SUDO, Glória Lúcia Perine inicia tis jenan agadon:
Enketleteroj kaj koncernaj listoj de nomoj kaj adresoj:
-Korektita adresaro de BEL-anoj, ne Delegitoj de UEA, de la Ŝtatoj Paraná, Santa Catarina kaj Rio Grande do Sul (115).
- Leteroj al BEL-anoj.
- Leteroj senditaj al urboj kun D,en kiuj ne ekzistas VD-oj (25).
-Leteroj al FD-oj en kies urboj ne ekzistas VD-oj (6).
-Leteroj senditaj al urboj sen D kaj VD: 6
Malgraŭ tio, ke la Regiona Delegito petis al la adresitoj sendi rekte al la ĈD koncernajn respondilojn kandidatiĝajn, nur unu plenumis la peton, kaj alia respondis al la Regiona Delegito, menciante klarigan eblecon de plenumo, jene:
"*Estimata Sudregiona Delegito, Saluton! Bedaŭrinde ŝajnas, ke escepte de mi, ĉi tie en mia malgranda urbo, neniu interesiĝas pri Esperanto. En Oktobro 2001, mi sukcesis aperigi E-on en Informila organo de Grupo Ipaussu Madeiras, la respondeculo intervjuis min. Ĝi estas malgranda, monata informilo,tamen pluraj urbaj personoj legas ĝin, sed ankoraŭ neniu interesiĝis pri tiu mirinda lingvo. Do mi resendas al vi la respondilon por Delegita Reto. Amike via,Valquíria Lorenço.*"

* * *

REGIONAJ DELEGITOJ:

Amazonia: Pekim Tenório Vaz,D kaj FD en Belém.
Centrokcidenta: Henrique A.K.Mendonça
Nordorienta: Wandemberg Ribeiro Morais D kaj FD en Fortaleza
Orienta: Luiz Alberto de Oliveira Coelho, FD en Paraíba do Sul.
Suda: Glória Lúcia Perine, D kaj FD en Curitiba.

AMAZONIA
CENTROKCIDENTA
NORDORIENTA
SUDA

SPRITE

LA ĜUSTA PRONONCO

En mia lando kelkfoje kelkaj samideanoj prononcas *"Esperanton"*.
Ili prononcas *"kelkaj"* kaj *"kelkaj"n*,kvazaŭ tiu vorto enhavus tri silabojn, sed ĝuste ili prononcas *"kaj"n* kaj *"ajn"n*.
Esperanto estas treege logika.
Ankaŭ *"punkto"*ekzemple enhavas nur du silabojn, kaj *"kvin"*, nur unu. Oni devas ne meti la literon *'i"* post *"k"* en tiujn du vortojn.
(José Roiz, FD en Belo Horizonte, MG)

*

ADRESARO DE RETE ATINGEBLAJ ESPERANTISTOJ KAJ ESPERANTO-ORGANIZOJ

Retadresoj de esperantistoj estas kolektataj ekde 1993. En la unua eldono aperis 310 retadresoj de 219 personoj el 23 landoj,adresoj de 67 landaj kaj lokaj organizoj/gazetoj, kaj tiuj de 18 internaciaj.
En la ĵus aperinta nova eldono (decembro 2001) aperas jam 3161 adresoj de 2148 personoj el 95 landoj kun 34 retaj delegitoj, 731 hejmpaĝoj,577 landaj/lokaj organizoj/gazetoj, kaj 78 internaciaj.
La adresaro estas elŝutebla ĉe:
http://home.wxs.nl/~lide/esperanto-adresaro_txt.zip
La kompilado de la Esperanta ret-adresaro postulas egan, kaj temporaban laboron,farita n volontule de Derk EDERVEEN <adresaro@wxs.nl> al kiu oni povas nur sincere danki la grandiozan kaj sinofertan agadon. En la listo momente enestas 230 nekonfirmitaj aŭ nefunkciantaj retadresoj, kiuj estas forigataj en komenco de 2002. Elŝutu do la adresaron, kaj kontrolu ĉu via adreso troveblas en ĝi, kaj se jes, ĉu ĝi estas preciza?Formularon por aliĝo aŭ korekto de adresoj vi trovas en la listo mem.La adresaro estas elŝutebla ĉe:
http://home.wxs.nl/~lide/esperanto-adresaro_txt.zip

fonto:ret-info
http://www.eventoj.hu

STATISTIKO

ATENTIGE:

En la Jara Raporto al UEA, la korekto-fo lioj, kiujn prizorgas la ĈD, ricevas noti taĵojn pri kiuj la ĈD estis informita dum la jaro.Notindas ke ne ĉiam la Delegitaro sciigas la ĈD-on pri ŝanĝoj, kaj tiujn li veras rekte al CO-UEA; aliflanke, la CO ne revenigas ilin al la ĈD;se la ĈD enke tas persone la delegitaron, depende de la koncerna dato, kompreneble multe antaŭ la jara raporta, novaj ŝanĝoj evidente po vas okazi. Kiel solvi?

-Ŝanĝojn la delegitaro sendus samtempe kopie al CO,ĈD kaj RD;

-Por okazantaj ŝanĝoj ne komunikeblaj ĝustetempe al la instancoj referencitaj supre, estu listigitaj aparte de la menci itaj respondeculoj al kiuj aliru inform petoj de koncernaj dubo-okazaĵoj. Ĉia maniere gravas sistemigo akordiĝa por akceligo efika. Kompreneble idealaj pro jekto-principoj dependas de sufiĉa hom disponebleco, la konstanta problemo de niaj organizaĵoj.

NOVAJ DR-POSTENULOJ

-Balneario Camboriu, SC: VD-FD Lean dro de Souza.

-Barra doGarças, MT: D-FD Amarilio Hevia de Carvalho.

-Bebedouro, SP: D-FD Nilza Moraes Razl
VD-FD Edson Razl

-Curitiba, PR: FD Luiz Carlos Barros

-Espirito Santo do Pinhal, SP:D-FD Antô nio Luis Lorurenço dos Santos

-Foz do Iguaçu,PR:D Manoel José Rocha Neto

-Guarani d'Oe..a, SP: Marcelo Silva dos Santos

-Mogi das Cruzes, SP: VD-FD Deibs Bar bosa

-Sao José do Rio Preto, SP:VD Mauricio Signorini Prado

-Sao Paulo, SP: FD Aparecida de Souza Araujo

Tanabi, SP: D-FD Juscelino Gama
: VD-FD Ariedne Davi

da

VD-FD Eurico Figueira
Uberlância, MG: VD-FD Luiz Cláudio Oliveira
NOVAJ URBOJ
Barra do Garças, MT
Foz do Iguaçu, PR
Guarani d´Oeste, SP
Tanabi, SP

*

UK-FORTALEZA
El la 18 respondeculoj de la Loka Kongresa Komitato 6 estas de la Delegita Reto:
D kaj FD Wandemberg Ribeiro Morais, Prezidanto
FD Paulo Amorim Cardoso, Vic-Prezidanto
FD Michelson Sávio Herbster Moura, Sekretario
JD kaj FD Iraneide de Oliveira Lopes, Infana Kongreseto
FD Afonso Silva de Lima, Personaro
VD kaj FD Tarcísio José de Lima, Artaj Aranĝoj

*

PROVIZORA PROGRAMO
Sabato, 03 aŭgusto:
Malfermo de la Kongresejo: 09h00
Dimanĉo, 04 aŭgusto:
Solena Malfermo: 10h00
Lundo, 05 aŭgusto:
Tago de la Libro, IKU, Ĉe-Seminario kaj kurso, Konversaciqj rondoj, IFEF, Belartaj Konkursoj, AIS,Ekzamenoj, Patronoj de TEJO, Komitato de UEA, Bankedo, Balo.
Mardo, 06 aŭgusto:
Tago de la Lernejo, IKU, Kongresa Temo, Ĉe-Seminario, Konversaciaj Rondoj, Brazila eksprese, IKEL, Ekzamenoj (skribaj), Estraro respondas, Landa Agado, Komitato, IKEF, Delegita Reto, Vizito al Infana Kongreseto, Teatro.
Merkredo, 07 aŭgusto:
Tuttagaj ekskursoj.
Jaŭdo, 08 aŭgusto:
IKU-prelegoj, Kongresa Temo,Amerika

Agado.Azia Agado, Ĉe-seminario kaj kurso, Konversaciaj rondoj, Fakaj asocioj, E kumena Diservo. Esperantologia konferenco, Ekzamenoj (parolaj), Brazila eksprese, CO respondas, Urbestra akcepto (por invitjtoj), Koncerto.

Vendredo, 09 aŭgusto:

IKU-prelegoj,Ĉe-seminario kaj kurso,Konversaciaj rondoj. Fakaj asocioj. Aŭkcio. Ĉefdelegitoj kaj perantoj, Venonta UK, Internacia Vespero.

Sabato, 10 aŭgusto:

Solena Fermo (10h00), Libroservo (ĝis 14h00). Fermo de la Kongresejo (14h00).

KONGRESA TEMO:

DIVERSECO - ŜANCO, NE MINACO

*

ARTO

Universala Artista Ligo de Esperantistoj (UALE) (fond. 1978): p/a D kaj FD Maria Pozder Almada organizas la artan ekspozicion dumkongrese.

* * *

VERKOJ

Verdire, ne eblas citi ĉiujn delegitretanojn, kun verktalentoj ĉar grandparte sin dediĉas ĉu literature, ĉu profesie, ĉu ĵurnaliste, ĉu prelege, ĉu instrue, ĉu movade, ĉu raporte, ĉu postene kun kompreneble surpaperigaj notitaĵoj. Dum redaktoraj taskoj por Brazila Esperantisto kaj La Lampiro tre ofte mi kontaktis ilin kaj apreze ilin konsideras. Fariĝus longa teksto se mi provus remorigi ĉiujn. Tiel, mi profitos per kelkaj enmanaj tekstoj pravigi ilian talenton:

*

INFANOJ NE ESTAS SOLDATOJ

(Teksto de FD Frato Bertino Goerner; Pindamonhangaba, SP)

"La okjara Filipo de Ruando batis plurfoje per la bastonego, aŭ uzis la maĉeton por tio. La plenkreskuloj estus al li dirintaj ke li devas mortigi. Laŭ informo de la porinfana helporganizo UNICEF pli ol 300 mil infanoj estas sensence ofertataj en militoj. En kiuj militoj ili devis batali, kiamaniere ili

devas batali,kiamaniere ili fariĝas traŭ mataj, obeemaj plenumontoj de koman doj, sed ankaŭ kiaj helpoj ebligas al i li ree okupi pacan lokon en la komu numon de sia popolo, estas la centraj temoj de tiu verko. Per tiu verko, el donita de ok grandaj helporganizaĵoj, la aŭtoro Max-Schoppenhorst, skribis la unuan germanlingvan kompendion pri tiu temo. (Reklamo).

*

DOKTORIĜA TEZO

(FD Adonis Saliba São Paulo, SP)

Mi finfine prezentis hieraŭ mian dok toriĝan tezon kaj ĝin defendis por pli ol kvar horoj. Sufera momento, uni ke vivata dumvive. Tamen, mi laŭ date sukcesis la taksitan aprobon.Mi fariĝis Doktoro pri Nuklea Teknolo gio en Materialoj (IPEN/USP). Mi ankoraŭ estas la plej freŝa brazila doktoro.Eble! Kelkaj aliaj doktoriĝ-oj (feliĉe) haste malfreŝigos mian hi eraŭan titolon. Tamen, bedaŭrinde, ne tiom solene kiel mi faris aldonan te, dum mia prezentado, mian tezan resumon en Esperanto. Almenaŭ u nu el la membroj de la juĝprofesora ro komprenis nian lingvon, (D-ro M. Linardi, nuklea fizikisto). kaj apre zis ĝian inkluzivon en la tezan do kumentaron. Por la ĝuo de la espe rantistaro, mi ĉi-sube sendas tiun resumon (eble minimume ŝanĝota) kiun mi faris dum la prezentado.La aliaj miris la aperon de Esperanto en tiu teknika materialo,sed serene akceptis la filozofian mesaĝon de nia lingvo, mienante aprobe.

Resumo:

"Disvolviĝo de fosfatiga proceso por korodprotektado de NdFeB-aj magne toj."

NdFeB-aj magnetoj estas gravaj mate rialoj por atingi energio-efikecon en elektromaŝinoj, tamen ili estas tenden caj al korodo. En tiu studo, oni esplo ras fosfatigan traktadon por korodpro tektigi de NdFeB-aj magnetoj. Fosfa

tigo estas ĝenerale uzata kiel kemia trakta do antaŭ apliko de posta protektokovrado. La fosfatiga proceso plibonigas la korodrezistan en difektitaj regionoj de eksteraj kovraĵoj, aldone, ĝi helpas en adhero de plie aplikita kovraĵo al la metala substrato. Komerca NdFeB-a magneto produktita per pulvormetalurgio, estis uzita kaj oni esploris, dum fosfatiga proceso, la efektojn de la jenaj parametroj: fosfatiga tempodaŭro, pH de la fosfatiga solvaĵo, anoda polarizado kaj aldono de molibdato al la fosfatiga solvaĵo. La rezultoj montris, ke okazas signifa kreskо en korodrezisto de la fosfatigitaj magnetoj en solvaĵo, kies koncentrigo estas inter 10-20 g/L $N2PO4$, pH en la intervalo de 3 al 4, 6 acidigo prefere farita de $H3PO4$ kaj je media temperaturo (20±1)°C. Konversiaj kovrotavoligoj,kiuj estas formitaj en solvaĵoj kun pH 3,8 montris pli bonan korodrezistan. Fosfatigaj tempoj, dum minimume 4 horoj,pligrandigis de 10 ĝis 20 fojojn la korodrezistan de la magneto. Tiu protekto kreskis kun pli longaj imersi-tempoj.Anoda polarizado de la magneto en la intervalo de 200 ĝis 400 mVSKE akcelas la fosfatigon. Rezultoj indikas, ke ĉeesto de molibdato en solvaĵo interagas prefere kun la Nd-riĉa fazo de la magneto. Du metodologioj estis enkondukitaj: elektado de specimenoj kun similaj elektrokemiaj sintenoj, bazite sur la kurentdenseco post 200 sekundoj da konstanta anodpolarizado; taksado de korod protekto, rezulte de konversia kovraĵo, per kontrolado de gasa evoluigo dum korodado en acida solvaĵo.

*

HISTORIO DE ESPERANTO EN BRAZILO

FD Osvaldo Pires de Holanda pretigas la verkon omaĝe al la centariĝo de Brazila Esperanto-Ligo, en 2007, per kompilado de ĉiuspeca referenco esperantista rilate agadon grupan, kluban, asocian aŭ personan. Per streĉa kaj sindediĉa laboro li kontaktas la medion en nia lando kaj enmanigis fruktodonan dokumentaron, tamen nepre atendas pliajn informojn kompletigajn. Lia adreso troviĝas ĉe urbo SP en UEA-Jarlibro.

VOLONTE

ESPERANTO EN LA LERNEJOJN

D kaj FD en Bauru,SP *Euclydes Geraldis de Carvalho* sendis jenan inviton al esperantistoj en februaro/2002:

"Konsiderante esti la afero Esperanto en la Lernejojn, *deziro de la plimulto da esperantistoj de Brazilo kaj de la mondo;*

Konsiderante ke tiu afero estas publikigita en "Brazila Esperantisto, (BEL), junio/2000, pp. 8/10.Temo de la 42-a Renkontiĝo de Esperanto de la Sudpraraiba Valo, Barra Mansa, RJ, 19/11/2000; estas publikigita en La Lampiro (EASP);n-ro 98, okt.nov.dec./2000, p. 4-8, "Boletim Informativo", kun daŭrigo en n-ro 99, jan. feb.mar/2001, p. 6-7 de tiu sama Revuo;

Konsiderante ke preskaŭ mil kopioj de tiu sama artikolo, en la portugala lingvo, sekvis al samideanoj de la tuta Brazilo, al Brazila Esperanto-Ligo kaj al preskaŭ cento da esperantistaj societoj;

Ni invitas vin partopreni en la kunveno realigota en San-Paŭlo, en "Gavea Palace Hotel",en la 13-a kaj 14-a 2002, sabato kaj dimanĉo, kun komenco je la 10-a horo (matene), por interŝanĝo de ideoj kaj, finfine, formo de laborgrupo kaj starigo de plano por plenumi la afe·on. Kalkulante pri via altvalora ĉeesto, ni antaŭdankas kaj subskribas frate, Euclydes Geraldis de Carvalho, D k FD en Bauru, SP k Cyro Barbosa Lima (VD kaj FD en Barra Mansa,RJ)

PLANPROJEKTO

1-Celo; Enkonduko de Esperanto en la lernobjektaron de la fundamentaj kaj mezgradaj instruadoj de Brazilo.

2-Kiel atingi la celon: Peti al la Nacia Kongreso ke ĝi donu al la Artikolo 26, paragrafo 5, Leĝo 9394, de la 20/12/1996, citita en nia artikolo sendita en marto/2001, novan redakton, pli malpli jene:

Artikolo 26, paragrafo 5- En la diversi gitan parton de la lernobjektaro estos devige enkondukita, ekde la kvina kla so, la instruado de almenaŭ unu moder na fremda lingvo, aŭ de la neŭtrala lingvo Esperanto,kies elekto apartenas al la lerneja komunumo, depende de la e blecoj de la institucio.

Oni pledu por la samo, rilate al la alineo III de la Artikolo 36, de tiu sama leĝo: *Artikolo 36, III- estos enkondukita unu moderna fremda lingvo, aŭ la neŭtrala lingvo Esperntto,kiel deviga lernobjek to,elektita de la lerneja komunumo, kaj unu dua, en opcia karaktero, depende de la eblecoj de la institucio.*

3-Laborgrupo: La samideanoj kiuj kunve nos en San-Paŭlo povos konsistigi labor grupon, kiu siavice, povos prepari defini tive la planon.

La Laborgrupo povos prezenti al la Prezidanto de la Ligo la planon,ĉar tiu afero konsistas unu el la celoj de tiu Institucio, laŭ la terminoj de la Statuto (" *Artikolo 4.a- Estas daŭraj celoj de la Ligo: - re prezenti la esperantistan movadon ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj ceteraj naciaj kaj internaciaj orga nizaĵoj, ligitaj aŭ ne al la esperantista movado. Artikolo 9.a- Estas rajtoj de ĉiuj membroj: -opinii, proponi, decidi kaj alsendi laborprojektojn favore al la brazila esperantista movado, sam kiel opinii en ĉiuj forumoj de deba toj kiuj tion celu.").*

* * *

REGIONAJ DELEGITOJ

AMAZONIA:
Pekim Tenório Vaz,D-FD:Belém,PA
CENTROKCIDENTO:
Henrique A.K.Mendonça, D-FD:
Anápolis, GO.
ORIENTO:
Luiz Alberto de Oliveira Coelho,
FD en Paraíba do Sul, RJ
SUDO:
Glória Lúcia Perine,
D-FD en Curitiba, PR

* * *

AMAZONIO:Belém, PA;Joanes, PA; Rio Branco, AC.

CENTROKCIDENTO: Alto Paraíso de Goiás, GO; Anápolis, GO; Aquidauana, MT; Brasília, DF; Campo Grande,MS; Catalão,GO; Cuiabá,MG; Gama,DF; Goiânia, GO.

NORDORIENTO: Aracaju, SE; Campina Grande, PB; Caruaru, PE; Fortaleza, CE; Ilhéus, BA; Itabuna, BA; João Pessoa, PB; Juazeiro do Norte, CE; Maceió, AL; Muritiba, BA; Natal, RN; Olinda, PE; Pocinhos, PB; Recife, PE; Salvador, BA; Teresina, PI; Viçosa do Ceará,CE.

ORIENTO: Além Paraíba,MG;Aracruz, ES;Araxá,MG;Barra Mansa,RJ;Belo Horizonte,MG,Campos dos Goitacazes, RJ; Duque de Caxias, RJ; Formiga,MG; Governador Valadares, MG; Ipatinga,MG; Juiz de Fora, MG; Montes Claro, MG; Niterói, RJ; Nova Iguaçu, RJ; Ouro Preto, MG;Paraíba do Sul, RJ; Patrocínio, MG; Petrópolis,RJ; Prata, MG; Resende,RJ; Rio Casca, MG;Rio de Janeiro,RJ; São Gonçalo, RJ; São João do Meriti, RJ; Serra, ES; Teresópolis, RJ; Três Rios,RJ; Ubá, MG; Uberlândia, MG; Valença, MG; Varginha,MG;Vitória,ES;V. Redonda,RJ.

SUDO: Araraquara, SP; Atibaia, SP; Balneário Camboriu, SC; Bauru, SP; Bebedouro, SP; Caçapava, SP; Cmpinas, SP; Campos do Jordão, SP;Caraguatatuba, SP; Cascavel, PR;Castro, PR; Chapecó, SC; Curitiba, PR; Espírito Santo do Pinhal, SP; Florianópolis, SC; Foz do Iguaçu, PR; Guarani d´Oeste, SP; Guaratinguetá, SP; Guarulhos, SP; Ipaussu, SP; Joinville, SC; Londrina,PR; Lorena, SP; Mauá, SP; Mogi das Cruzes, SP; Paulínia, SP; Pelotas, RS; Pindamonhangaba,SP;Porto Alegre, RS; Presidente Prudente, SP; Ribeirão Preto, SP; Rio Grande, RS; Santiago, RS;Santo André, SP; Santos, SP; São Bernardo do Campo,SP; São José do Rio Preto,SP; São Paulo, SP;São Sebastião do Caí,RS; Sorocaba,SP;Taubaté, SP.